

INTERNACIA LERNEJA ESPERANTO-REVUO


DECEMBRO 1977



4-A JARO, N-ro 3 (12)



FELIĀN  
NOVAN  
JARON **1978**



## Antaŭ la 10-a jar'deko

Tio, pri kio revis — dum pasintaj jar'centoj — grandaj pensuloj de la homaro: *Descartes*, *Komenský*, *Leibnitz*, *Newton* kaj multaj aliaj, tio plen'um'igis antaŭ 90 jaroj. La genia<sup>1</sup> verko — en formo de maldika broŝuro<sup>2</sup>, kun „plena” gramatiko<sup>3</sup> el 16 mallongaj reguloj — aperis, unue. rus'lingve en *Varsovio*, la 14-an de julio 1887.

La Internacia Lingvo baldaŭ trovis sin meze de akraj atakoj. Ne multaj personoj havis la kuraĝon el-diri malkaŝe: Esperanto post-vivos sian infan'aĝon. Kaj jen, ĉi-jare, ni festas ĝian 90-an

naskiĝo-jaron! Ĝi trans-vivis du terurajn mond'militojn, multajn persekutojn<sup>4</sup> kaj grandajn tertremojn. La modesta broŝureto ne perdis sian valoron.

Hodiaŭ, Esperanto havas antaŭ si vastajn horizontojn<sup>5</sup>.

La demandon „Kial do la Internacia Lingvo ne dis-vastiĝas pli rapide?” ni povas respondi jene:

Ideo, kiu ne havas malantaŭ si miliardojn da dolaroj<sup>6</sup>, sed nur kelkajn cent-milojn da sin-donaj homoj, ne povas rapide venki. Aparteno al movado — kiu ne promesas mon'gajnon, sed kontraŭe, rezultiĝas el-spezojn — ne



Nemzetközi eszperantó diáklap  
Megjelenik évente háromszor.  
IV. évf. 3. sz.

Felölős szerkesztő: Kurucz Géza

Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség  
1081 Budapest, Kenyérmező u. 6.

Felölős kiadó: Vaskó Tibor

Készült a Somogy megyei Nyomdaipari Vállalat kaposvári üzemében  
— 77-5282 — 5000 példányban

Felölős vezető: Farkas Béla igazgató



## de Esperanto

estas tre populara<sup>7</sup> nun-tempe.

Kaj ne forgesu: batalo por io nova kaj nobla neniam estis facila; sed, feliĉe, ĉiam vivis milio-  
n'ope homoj, pretaj labori por granda afero kaj sen rigardi al sia propra poŝo.

Ni devas trovi tiujn milio-  
nojn da homoj, ĉar ili estas niaj plej proksimaj amikoj. Nur kune kun ili, ni sukcesos atingi la celon, nome: la oficialigon de la Internacia Lingvo en multaj kampoj de la homa aktivado<sup>8</sup>. Helpu al ni en tiu malfacila sed nobla agado!

1. genio: ekster-ordinara kapablo krei ion novan/ 2. tre maldika libreto/ 3. scienco pri la lingvaj reguloj/ 4. persekuti: malamike rilati al io; malhelpi per ĉiuj rimedoj/ 5. horizonto: limo de la vid- aŭ pens'kapablo/ 6. dolaro: mon'unuo en Usono, ekzemple/ 7. kon'ata kaj uz'ata de la popolo/ 8. agad'kapablo.

1. festo pri dat're-veno de grava fakto/ 2. festas publike/ 3. fandi: produkti ion en formujo/ 4. estas nepra (kondiĉo)/ 5. reciproka altiro pro simileco de gustoj, opinioj/ 6. ne-kapabla paroli/ 7. balbuti: malfacile paroli/ 8. preferos, helpos/ 9. prenas ion kiel veron kvankam mankas pruvoj/ 10. stagni: restadi sen-mova, sen-aga/ 11. tempo-daŭro/ 12. estas maltrankvila/ 13. peno, atingo de celo/ 14. estas tre efika pro sia grandeco.

*William Auld (:viljem old)*

## LETERO

okaze de la 90-jara jubileo<sup>1</sup>  
de Esperanto  
(El-ĉerpaĵo)

*Mortigi Esperanton ja ne eblas  
— Provadis pluraj dum la histo-  
rio,*

*Sed nian naŭdek-jaron ni  
celebras<sup>2</sup>*

*En pelna fida forto de  
l' funkcio,  
Fanditaj<sup>3</sup> en formujon, kiu  
nepras<sup>4</sup>*

*Al homoj de aparta simpatio<sup>5</sup>,  
Do ĉiu, kiu tra la mondo tuta  
Ja hontus esti muta<sup>6</sup>, aŭ balbuta<sup>7</sup>!*

*De l' mod' ni ne de-pendas, sed  
la modo*

*Iam al ni favoros<sup>8</sup>, mi supozas<sup>9</sup>.  
Post stagno<sup>10</sup> venos nia  
periodo<sup>11</sup>...*

*Sed inter-tempe mi ne tre  
neŭtrozas<sup>12</sup>*

*Pri l' ŝajna malsukceso de  
l' klopodo<sup>13</sup>,*

*Ĉar Esperanto lingve  
grandiozas<sup>14</sup>*

*Kaj, per ĝi, al anim' anim'  
parolas,*

*Pruv'ante, ke kapablas, kiu  
volas...*

## VORTO DE ZAMENHOF

„Ni ne estas tiel naivaj<sup>1</sup>, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neŭtrala<sup>2</sup> fundamento faros el la homoj anĝelojn<sup>3</sup>; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunik'ig'ado<sup>4</sup> kaj konat'ig'ado sur neŭtrala fundamento for-igos almenaŭ la grandan amason de tiuj best'aĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭz'ataj ne de malbona volo, sed simple de reciproka sin-ne-konado kaj de dev'ig'ata sin-al-trudado<sup>5</sup>.”

1. kred'emaj kiel infanoj/ 2. ne vol'anta partopreni en diskuto, batalo aŭ milito/ 3. loĝantoj de la ĉielo-lando/ 4. ĉi tie: kompren'ig'ado/ 5. trudi: devige akcept'igi ion.

## DE SAĜO SUR ARBO AL MODERNA ABOCO



### DIS-VASTIĜO DE SKRIBO-SISTEMOJ

La vojo ne estis tiel simpla, kiel ĝi aspektas sur la mapo; tamen, ĝi estas proksima al la historia vero.

ΑΑΑααα  
 Εεεεεε  
 Γγγγγγ



MEZ'EPOKA  
 MONAĤO CE  
 SIA SKRIBO-  
 TABLO

Dum la mezepo-  
 ko, la monaĥoj  
 kaj la sacerdotoj<sup>2</sup>  
 skribis belegajn  
 librojn per plumoj  
 anseraj<sup>1</sup> aŭ mele-  
 agraj<sup>1</sup> aŭ kanaj  
 Supre, vi vidas  
 kiel ek-estis la

„malĉefaj literoj“ (minuskloj) el la „ĉefaj literoj“ (majuskloj) pro rapida skribado. La materialo estis pergameno (ledo el azenaj aŭ ŝafaj feloj), tre maldika kaj tre multe-kosta.

III

Kiam Romio atakis Gerkujon la skrib'arto iris plu okcidenten. La romi'anoj simpligis la liter'aron de la grekoj; kaj tiel formiĝis la latina alfabeto. Sed la grekaj skribo-signoj ne mortis. Ili „ek-vojaĝis“ ankaŭ orienten, kie ili fariĝis la alfabeto de la antikvaj<sup>2</sup> slavoj<sup>3</sup>.

Rigardu la mapon<sup>4</sup>! Post la dis-falo de la Romia Imperio<sup>5</sup>, estiĝis du grandaj imperioj: Okcidenta kaj Orienta Romanioj. En Okcidenta Romanio, oni uzis la latinan abocon; en la Orienta — la antikvan grekan, en la formo de la slava azbukon (=aboco).

Rusa caro<sup>6</sup>, la memor'inda Petro la Granda, simpligis la azbukon, kiu nun multe similas al la latina alfabeto.

Granda revolucio de la mondo estis la el-trovo de la libro-presado. Fama germano: Gensfleisch (:gensflajŝ, ĝenerale nom'ata Gutenberg (:gutnberk) el-trovis, ĉirkaŭ la jaro 1436, ion similan, kian el-pensis fenicoj sia-tempe. Ĉar la literoj, dum skribado, ripetiĝas, estas eble fabriki ilin el metalo unuope, kaj poste komposti<sup>7</sup> ilin. Fine, oni metas sur ilin inkon, kaj premas — presas — la literojn sur paperon. Gutenberg uzis premilon de vin'beroj kun tia celo. La libro-presado naskiĝis.

De tiu tempo, la pli kaj pli modernaj presiloj presas kaj presas sen-halte; ili verŝas milionojn da presaĵoj en la mondon.

J. Klement (Ĉeĥoslovakio)

**S**i qua ergo cōsolatō  
solatiū caritatis. si  
spiritus. si qua vifreni



**MALNOVA PRESEJO  
EL LA 16-A JAR'CENTO**

*Antaŭe, estas du presistoj ĉe  
vin'bera premilo, ali'formita  
por presado de libroj. Malantaŭ  
ili sidas du kompostistoj, kiuj  
vic'igas la literojn.*

1. pra-tempa pafilo; longa kaj pinta braĉento el-paŝebla/ 2. pra-tempaj/ 3. popoloj sam'devantaj: al ili apartenas: rusoj, poloj, ĉeĥoj, serboj k. t. p./ 4. land'karton/ 5. grandega ŝtato/ 6. reĝo de rusoj/ 7. en presado aranĝi literojn en ĝusta ordo/ 8. ekleziuloj/ 9. grandaj kort-birdoj.

**ABC**  
POR KOMENCANTOJ

**KIEL MANITU<sup>1</sup> KREIS LA HOMON?**

*(Mito<sup>2</sup> de Usonaj indianoj)*

Kiam Granda Manitu decidis krei la homon, Li prenis pec'egon da argilo<sup>3</sup>, donis al ĝi la formon de homo, kaj bakis ĝin ĉe fajro.

Sed... ĉar mankis al Li sperto, la unua provo malsukcesis: la kreaĵo estis tro-bak'ita je karbo. Malgraŭ tio, Li donis al ĝi vivi-povon. Tiel ek-estis la negro<sup>4</sup>.

Dum la dua, provo, Li estis pli atenta, eĉ tro. Ĉi-foje, Li frue el-prenis la argil'ajon. Tiel ekestis la blanka homo.

Post du malsukcesaj provoĵ — per kiuj Li akiris sperton — Li senarare bakis la trian kreaĵon. Ekestis perfekta estulo: la vere belega ruĝ'haŭta indiano.

Laŭ W. Zytynski (Pollando)

1. dio de indianoj; indiano: ruĝ'haŭta pra-loĝanto de Ameriko/ 2. rakonto pri dioj aŭ praavoj, pri iliaj agoj en la komenco de la tempoj/ 3. flava tero, bone form'ebla/ 4. nigr'ulo.

# AMIKECO

## Laŭ rakonto de Ilmar Sikemäe (Estonio)

En suno-plena posttag'mezo, Jannu multe ŝalm'ludis<sup>1</sup>. Poste, li sidiĝis laca, aŭskultis la susuradon<sup>2</sup> de la arboj, kaj rigardis la or'flavajn florojn de la kampo. Ili ŝajnis palaj<sup>3</sup>, la arboj — malgrandaj kaj fremdaj.

Kelkaj bovoj direktis sin al fremda paŝtejo<sup>4</sup>. Jannu leviĝis. Venteto karesis<sup>5</sup> la vizaĝon, kaj kun-rulis dolĉe freŝan odoron de printempo. Li haltis por momento.

Subita vento-puŝo al-portis kun si, de la rivero, strangajn sonojn, similajn al ploreto de infano. Poste, silento. Nova vent'ondo, kaj ree mallaŭtaj krietoj, kvazaŭ iu vokus por helpo.

Jannu kuris pli proksimen kaj, en la rivero, li vidis nigran volvaĵon sub-akviĝi kaj supren-iĝi.

Tiu estaĵo voĉ'etis dolore; eĉ la vento ŝajnis plori kun ĝi.

Ten'ante sin je borda saliko<sup>6</sup>, Jannu sukcesis atingi kaj tiri ĝin al la bordo. Ĝi estis hundo, ankoraŭ ido. Ŝnuro ĉirkaŭ-premis la kolon. Certe, iu volis dronigi<sup>7</sup> la hundon, sed la ŝtono estis malpeza, kvankam sufiĉa, por tiri ĝin, de tempo al tempo, en la profundon.

Jannu atent'eme for-igis la kaptomaŝon<sup>8</sup>. Per buŝo, la hundo kaptadis por aero. Li karesis ĝian frovund'itan kolon. La okuloj ek-havis forton malfermiĝi. Varmadank'emo brilis en ili.

Jannu sentis, ke ĝia koro pleniĝas de varmo. Ĝi kuŝigis sian kapon sur la genuon de la knabo, kiu ne sciis, kio igis lin diri en sia interno: „malfeliĉa besteto!” Li loĝis inter fremduloj, malproksime de sia hejmo; li estis sen-signifa knabeto, kaj li antaŭ-sentis, ke li trovis amikon por si.

La hundo baldaŭ re-konsciigis;



ĝi saltis sur siajn piedojn. Jannu levis la besteton, kaj premis ĝin al si. Lia rigardo haltis sur la tremanta buŝo de la hundo kaj, en la sekva momento, ĉi tiu jam manĝis panon.

Kiam vesper'iĝis, la bovoj paŝadis en la direkto al la „hejmo”, kaj, malantaŭ ili, marŝis gaja paŝisto kun sia hundo, kiu jam havis nomon: „Musti”.

Ĝi ricevis molan dorm'lokon en angulo de la bovejo.

Jannu fakte trovis, por si, amikon. Ĉi tie, ĉiuj estis fremdaj; sed ekzistis malgranda estaĵo, kiu svingis<sup>9</sup> sian voston kaj lekis<sup>10</sup> la manojn kaj piedojn de la knabo. Kvazaŭ nova sango fluis en la kordon de Jannu. Li dividis sian manĝaĵon kun la hundo; kaj, kiam ĝi havis bonan apetiton, li estis preta en-lit'iĝi nur duon'sata.

Pro la zorgemo de Jannu, la hundeto estis dankema. Lac'iĝ'inte, li povis trankvile kuŝi sur la monteto. Musti post-kuris la bovojn, bojis<sup>11</sup> sub ilia vosto, ĝis, fine, ĝi atingis sian celon.

Ne plu estis tede<sup>12</sup> paŝti. Ĉiu tago diferencis de la antaŭa. Musti ne permesis, ke la knabo sidu malgaja. Ĝi faris ĉion, por ke li malfermu la buŝon, kaj diru kelkajn vortojn, aŭ ke aperu almenaŭ unu sola rideto, sur lia vizaĝo. Ĝi ellernis iri du-piede, eĉ trans-kap'iĝi. Plej agrable estis, tamen, kuŝi unu apud la alia.

Rapide for-pasis la someraj tagoj. Jam falis la unuaj oraj folioj, kaj blovis malvarmaj, tranĉetaĵ ventoj, kiuj tra-iris la karnon<sup>13</sup>

kaj la ostojn. Nun, ili kuŝis tute proksime, flanko ĉe flanko. Jannu kantetis, kaj Musti akompanis lin boj'ante.

Sed la granda amikeco devis rompiĝi. Tiel volis la sorto.

La vespero estis bela, la suno malleviĝis ruĝe. Jannu ricevis la lastan laboron por tiu vespero. Li devis dis-haki kukurbojn<sup>14</sup>, por la sekva tago. Mallum'iĝis. Al-proksimiĝis pluvo-nubo, kaj jam falis la unuaj gutoj.

La proksima pluvo kaj la malsato dev'iĝis la knabon al rapida laboro, kaj la unua hako jam frapis en la lingnan kuvon<sup>15</sup>. De tie, respondis akra krio. Jannu ek-timis kaj kaptis en la ujon. Ŝango ŝprucis<sup>16</sup> sur lian manon. Liaj ma-

1. ŝalmo: bloy'muzikilo, tubo kun truoj/ 2. susuri: el-igi malfortan sonon de folioj, kiuj sin movas en venteto/ 3. tia, ke ĝi perdis sian naturan koloron/ 4. paŝti: igi bestojn manĝi herbon en kampo/ 5. delikate tuŝis/ 6. arbo, kiu kreskas en malseka tero/ 7. mortigi en akvo/ 8. maŝo: ŝnuro, kiu tra-iras sin mem, kaj taŭgas, ekzemple, por mortigi aŭ kapti bestojn/ 9. rapide kaj ripete movi en la aero tien kaj reen/ 10. karesis, tuŝetis per lango/ 11. blekis kiel maldoj faras/ 12. tedi: malagrabla efiki pro troa daŭro aŭ ripetiĝo/ 13. karno: tio, kio kovras la ostojn de homoj kaj bestoj sub la haŭto/ 14. grandega frukto de rampa kreskaĵo/ 15. granda ne-profunda kaj ne-kovr'ita vazo el





## LANGO-ROMPILOJ

*Diru rapide, sen lang'eraro, la ĉi-subajn frazojn!*

1. *Ŝi ŝiris ŝoson<sup>1</sup> de ĉe-ŝosea<sup>2</sup> arbo.*
2. *Paŭla aŭdas kun bedaŭro, ke hieraŭ aŭto knokaŭtis<sup>3</sup> la laŭtan Paŭlon.*
3. *Turka tramo<sup>4</sup> trafis trotantan<sup>5</sup> trompiston.*
4. *Fajro flagris<sup>6</sup> lante<sup>7</sup> longa-lange.*

1. juna folio-hava branĉo/ 2. ŝoseo: bon'kvalita vojo/ 3. tre forte batis per pugno/ 4. elektra vagono sur urbo-strato/ 5. troti: kur'eti/ 6. moviĝis kiel flago sub la efiko de vento/ 7. malrapide.

noj tremis kaj, sen-helpe, ili tenis la barakt'antan hundon, kun hakita kolo. Varmega sango de la amiko fluis sur la manojn.

Li volis ion fari; sed... kion entrepreni? Unu vorto tamburis<sup>17</sup> en lia kapo: „Amiko! Amiko!...”



ligno/ 16. rapide kaj forte elĝi en formo de koloneto/ 17. tamburo: muzikilo per frapoj/ 18. tia, ke ĝi perdis la saĝon/ 19. larmo: guto, kiu el-fluas el la okuloj ĉe ploro/ 20. forte promesus kaj prenis Dion kiel atestanton/ 21. kovriloj de la okuloj/ 22. forte ŝiris, tiris, movis/ 23. senvestaj; nekovritaj per ŝuoj.


La hundo, kvazaŭ freneza<sup>18</sup> pro timo kaj doloro, serĉis helpon. La okuloj estis malespere larĝaj, larmo-plenaj<sup>19</sup> kaj malgaj'egaj. Ĝia piedeto ripozis en la mano de Jan-  
nu, kvazaŭ ĝi ĵurus<sup>20</sup> eternan fidelecon kaj por-ĉiaman amikecon. Sed la piedo lasta-foje sku'igis.

„Musti! Musti! Musti!” — Jan-  
nu premis al si la malvivan korpon de la hundo, kaj longe li ri-  
petis la samon. Se ĝi nur vivus ankoraŭ! Jannu al-portus al ĝi eĉ alies manĝaĵon; li ŝtelus, por ke ĝi ne bezonu en-iri en la kuvon por la manĝaĵo de porkoj... Tro malfrue, jam tro malfrue! Pezaj palpebroj<sup>21</sup> kovras la okulojn de la hundo. Neniam plu vivo-fajro fulmos en ili.

Jannu kuris kun la mort'inta hundo sur la brakoj. Tranĉa aŭtuna vento taŭzis<sup>22</sup> liajn vestojn, malsekajn de pluvo. Liaj nudaj<sup>23</sup> piedoj puŝigis al ŝtonoj, en la mal-lumo. Ili doloris; sed li kuris, konsci'ante pri nenio. Li kuris kaj kuris...

El la estona lingvo tradukis:

*Benita Kärt (:kert)*



# SANKTA LUĈIA

Itala kanto  
 el „Esperantista kantaro”

Tradukis: Clarence Bicknell

Re-verkis: Bernard Thaillet

Modere


Ve-nas la nok - to. Ĉe l' fir - ma - men - to bri - las u -  
 nu - a stel' el ar - gen - to. De sur la ma - ro, vo - ko ma -  
 gi - a: Sank - ta Lu - ĉi - a, sank - ta Lu - ĉi - a.

- |  |   |
|--|---|
| <p>1. Venas la nokto. Ĉe<br/>           l'firmamento<sup>1</sup><br/>         brilas unua stel' el arĝento.<br/>         De sur la maro, voko magia<sup>2</sup>:<br/>         Sankta Luĉia, sankta Luĉia.</p> <p>2. Dancas barketoj<sup>3</sup> sur mara<br/>           ondo.<br/>         Vento blovetas de l'horizonto<sup>4</sup><br/>         Lumas la luno pale<sup>5</sup> radia...<br/>         Sankta Luĉia, sankta Luĉia.</p> <p>3. Nokta vualo<sup>6</sup> jam sin etendas<sup>7</sup>.<br/>         Vokas barkisto: „Mi vin<br/>           atendas!”<br/>         Logas pejzaĝo<sup>8</sup> plej idilia<sup>9</sup>...<br/>         Sankta Luĉia, sankta Luĉia.</p> | <p>4. Mi vin invitas; venu do, kara,<br/>         por promonado bela,<br/>           sur-mara.</p> <p>Ĝuu<sup>10</sup> la ĥoron! Estu konscia!<br/>         Sankta Luĉia, sankta Luĉia.</p> <p>5. Ho, dolĉa Napoli! Tero benata,<br/>         de ĉiuj homoj mult'admir'ata!<br/>         Vi, sen-kompara,<br/>           bel'harmonia<sup>11</sup>!<br/>         Sankta Luĉia, sankta Luĉia.</p> <p>6. Ne-forgesebla ĝoj'plena horo,<br/>         vivu eterne en mia koro!<br/>         Kanto sopira<sup>12</sup> kaj<br/>           nostalgia<sup>13</sup>:<br/>         Sankta Luĉia, sankta Luĉia.</p> |
|--|---|

1. ĉielo/ 2. hav'anta ekster-ordinaran efikon, kvazaŭ super-naturan forton/ 3. ŝip'etoj/ 4. rando de la ĉielo/ 5. ĉi tie: malforte/ 6. delikata kaj tra-videbla teksaĵo; per vualo virinoj kovras sian vizaĝon/ 7. sin etendi: dis-vastiĝi/ 8. okul'plaĉa ĉirkaŭ-aĵo/ 9. trankvila kaj alloga/ 10. sentu plezuron/ 11. harmonio: okul-plaĉa aranĝo de diversaj partoj de la tuto/ 12. sopiri: forte deziri re-trovi ion, kio perdiĝis/ 13. malgaja; forte dezir'anta re-vidi sian patrion aŭ hejmon.

## Proverboj

*Estas pli da tagoj ol da kolbasoj.  
Por laboro bona, temp' estas bezona.  
Tro rapida faro estas nur baro.*



Laŭ nia promeso, vi ree trovas 7 litero-dekojn. Konstruu el ĉiu el ili unu vorton, laŭ la reguloj, don'taj en la antaŭa 11-a numero (septembro 1977), sur la 21-a paĝo!

Ni atendas viajn vortojn sur kvadrat'ita papero. Lim'dato: la

31-a de marto 1978. Adreso: G. Kurucz; Hitel u. 10. fszt. 16.; H—6000 KECSKEMÉT; Hungario.

(1) O C N \* E T N A S I (4) T G S E B \* D A O I  
4 2 6 5 8 3 1 9 7 2 4 7 5 1 1 3 8 6 4 8

(2) P H I V A O K P Ē B (5) U I N A M A Z P L O  
7 8 6 6 3 4 1 2 9 5 5 1 6 8 3 2 9 5 7 8

(3) K O L A Ĉ U A M O G (6) F V O R Ŭ O \* H J A  
1 6 2 0 8 9 3 5 2 7 2 6 0 9 5 3 4 1 8 9

(7) E T M I L Ŝ E S V M  
6 1 2 7 4 9 8 7 4 5



(1877—1919)

1 El-stara poeto<sup>1</sup> de malgranda nacio. Lia „Novaj poemoj<sup>2</sup>” (1906) revolucie modernigis la literaturon en lia lando. Li verkis ankaŭ gazet’artikolojn<sup>3</sup> pri Esperanto.

2 (1770—1827)

Unu el la plej grandaj komponistoj<sup>4</sup> de la mondo. En la jaro 1818, li perdis sian aŭdo-kapablon, kaj vivis en izolo<sup>5</sup>. Li post-lasis 9 simfoniojn<sup>6</sup> kaj unu operon<sup>6</sup> „Fidelio”.



(1869—1948)

3 Politikisto, el-star’ulo de naci’liberiga movado. Li studis en Londono, kaj plur’foje, estis ŝet’ita en malliber’ejon. Dum sia vivo, li ricevis la nomon Mahatma (= sankta animo).

4 (1889— )

Film’aktoro<sup>7</sup> kaj reĝisoro<sup>8</sup>. Li akiris mond-famon jam en la tempo de silentaj filmoj. Per lia talento<sup>9</sup>, li servis al monda paco kaj progreso.



5 (1925— )

Geniulo<sup>10</sup> pri elektro-fiziko. En la jaro 1973, li ricevis Nobel-premion por la el-trovo de „Esaki-diodo<sup>11</sup>”. En la sekv’inta jaro, li estis honor’ig’ita per Glora Ordeno de Kulturo.

6

El-stara naĝistino inter multaj mond’famaj sportistoj de sia lando. Si gajnis kvar orajn medalojn<sup>12</sup> en la Olimpiaj Ludoj de Montreal.



# enigmo

Sur la 12-a paĝo, vi vidas kelkajn fotojn pri mond'famaj homoj. Apude, du ĝis tri frazoj prezentas la atingojn de la koncernaj personoj.

Via tasko estas: re-koni la prezent'itan eminentulon, kaj sendi la nomon kaj naciecon de ĉiu el ili al s-ro Dieter Berndt; Berolinastr, 2; 102 BERLIN; GDR.

1. versisto/ 2. versaĵoj/ 3. mallonga verko en gazeto/ 4. muziko-verkistoj/ 5. soleco/ 6. simfonio, opero: speco de muzikaj verkoj/ 7. artisto, kiu prezentas rolon en filmo/ 8. homo, kiu estras filmo-faradon/ 9. hav'anta el-staran kapablon/ 10. trt talenta, saĝ'ega homo/ 11. elektrona tubo/ 12. ronda matala (ora, arĝenta, bronza) peco por gajn'into.

## <sup>A</sup> Ĉu vi scias, ke...

- (1) dum unu tago, la haroj — kiuj kovras la homan korpon — en-tute kreskas ĉirkaŭ 30 metrojn.
- (2) la nomo de Eŭropo de-venas de la fenica vorto *eref* (greke: *erebos*), kiu signifas: *sun'sub-iro*.
- (3) la plej malnova gazeto de la mondo estis la „*Pekina Gazeto*”, fondita en la jaro 363 kaj ĉes'inta en 1935.
- (4) pli ol 3 mil lingvoj estas parol'ataj.
- (5) laŭ la geofizikisto<sup>1</sup>, Jeffreys, antaŭ 4 miliardoj da jaroj „la tago daŭris nur 5 horojn. La rotaciadon<sup>2</sup> de la Tero malrapidigas la Luno.
- (6) Ameriko estis trov'ita almenaŭ tri-foje: ĉirkaŭ la jaro 1000 fare de la normano *Leif Erikson*, en 1472 fare de la dano *John Scotus*, kaj en 1492 fare de *Kristoforo Kolumbo*.
- (7) la bulgaroj plej multe manĝas legomaĵojn en la mondo.
- (8) La unua televida el-sendo okazis en Londono, la 2-an de novembro 1936.
- (9) abeloj povas — per speciala „danco” — sciigi al kun-uloj ne nur la direkton al trovitaj floroj, sed ankaŭ ties precizan distancon.
- (10) oni vidas la ĉielon blua, ĉar la bluaj lum'ondoj (la plej mallongaj) dispersiĝas<sup>3</sup> per polv'eroj en la aero.
- (11) dum eksplodo de stelo (supernova) ek-estas energio 6 milion'oble pli forta ol tiu en nia stelo (la Suno).

1. fizikisto, kiu studas la fizikajn ecojn de la Ter'globo/ 2. rotacii: turn'iĝi ĉirkaŭ sia akso/ 3. dis-jet'iĝas.

**ABC**  
POR KOMENCANTOJ

*S-ino Saranath,  
nia nova  
kun-labor'antino  
en Hinda Unio.*



## PUN'ITA BEGAMO

Reĝo Akbar havis plurajn edzinojn. Iam, unu el ili iĝis kverel-ema<sup>1</sup>. Multaj anoj de la palaco<sup>2</sup> plendis pro ŝi, kaj ŝi agis malĝentile eĉ kontraŭ la reĝo mem. Ŝia mis-konduito tre ĉargenis<sup>3</sup> lin. Tial, li decidis, fine, for-sendi sian begamon (= edzinon). Li vokis ŝin kaj diris: „Paku viajn aĵojn, kaj re-iru al via patra domo! Mi ne plu bezonas vian ĉeeston. Tuj for-iru!”

La begamo ploris kaj plendis<sup>4</sup> antaŭ Akbar, sed li ne mildiĝis.

Tiam, ŝi riverencis<sup>5</sup> kaj tuŝis eĉ liajn piedojn. Akbar ek-sentis iom da kompatato kaj diris: „Mi malpermesas al vi resti ĉi tie; el-iru el la palaco! Sed antaŭ ol vi for-lasos ĝin, vi rajtas kun-preni unu aĵon, kiun vi elektas en la palaco.”

Re-ven'inte en sian ĉambron, ŝi pensis: „Ĉi tiu favoraĵo<sup>6</sup> ne feliĉigas min; male, ĝi neniel utilas al mi. La afero urĝas, kaj mi devas el-pensi ion.” Ŝi pensis profunde, kaj memoris pri Birbal, la ministro<sup>7</sup> de la reĝo. Li estis helpema al ĉiu, kiu bezonas helpon. Sed nun, ŝi ne kuraĝas peti lian helpon, ĉar, antaŭ ne-longe, ŝi persone inter-venis ĉe la reĝo favore al la kort'eg'anoj, kiuj volis maldungi<sup>8</sup> la ministrojn Birbal. Tamen, krom li, neniu povas elpensi ion por savi ŝin.

Ne vid'ante alian el-iron, ŝi sendis, fine, por venigi lin. Je ŝia granda surprizo<sup>9</sup>, Birbal baldaŭ aperis, kaj prezentis sin antaŭ la begamo. Aŭd'inte pri la okazaĵo, li tuj havis pretan planon, kaj li flustris<sup>10</sup> ĝin al ŝi. La begamo re-gajnis sian gajecon kaj, tre dankema, ŝi diris al li: „Birbalmi multe bedaŭras, ke iam mi komplotis<sup>13</sup> kontraŭ vi...” Tiam Birbal subite interrompis ŝian parolon dir'ante: „For-viŝu el via memoro la pas'int'aĵon, kaj vivu en la nun-tempo!” Li diris tion kaj foriris.

Iom poste, la begamo petis, ke Akbar vizitu ĉe ŝi. Akbar venis kaj sidiĝis. Ŝi al-portis glason da frukto-suko, kaj diris: Mi mem faris ĉi tiun fruktosukon por vi. Ne rifuzu mian peton. Bon'volu trinki ĉar, eble, neniam plu mi povos vin vidi!"

La reĝo konsentis kaj trinkis la tutan sukon. Sed, tuj poste, li sentis sin dormema, kaj baldaŭ li falis en profundan dormon. Tiam, la begamo frapetis sur la plankon, kaj ŝiaj servistoj alportis du palankenojn<sup>12</sup>. Ŝi ordonis al siaj servistoj kuŝigi la dorm'antan reĝon en la unuan, dum ŝi en-iris en la alian, kaj diris: „Nu, ni iru al la domo de mia patro!"

Kelkajn horojn poste, Akbar vekigis, kaj vidante la ĉirkaŭ-ajon, li konfuziĝis<sup>13</sup>. Li vokis serviston, sed tiam eniris la begamo. Li demandis: „Kie mi estas?" La begamo respondis per alia demando: „Kion signifas via demando? Vi estas en via propra domo." Akbar iris al la fenestro kaj rigardis eksteren. Li diris: „Certe, ĉi tiu ne estas mia domo."

„Ĝi estas mia patra domo", respondis la begamo. Ĉu vi memoras, ke vi permesis al mi kunpreni tion, kion mi elektas? Do, mi kunprenis vin, ĉar nur vin mi amas, kaj mi respektas vin pli ol ion alian en la mondo. Nu, laŭ via ordono, de nun, vi devas resti ĉi tie, kun mi."



La respondo plaĉis al Akbar. Li miris, ke la begamo superruzis lin. Li diris al ŝi: „Re-venu! Ni iros kune al la palaco.”

Rakontis: s-ino *Saranath* (Hinda Unio)

1. batal'ema per sia lango/ 2. granda kaj bela domo/ 3. kaŭzis malĝojon al li/ 4. parolis por defendi sian aferon/ 5. klinis sin ĝentile por esprimi respekton/ 6. tio, kio donas al iu preferon antaŭ la ceteraj personoj/ 7. estro de iu fako en regist'aro/ 8. dungi: akcepti iun por certa tempo kiel oficiston, laboriston k. t. p./ 9. surprizi: trafi iun ne-atend'ite/ 10. diris mallaŭte en orelon/ 11. komploto: sekreta ligo kontraŭ iu/ 12. palankeno: lit'seĝo en orientaj landoj, kiun portas servistoj per-mane/ 13. venis en staton, en kiu li ne povis distingi ion de alio.

#### PIEDNOTOJ DE PRI LA SAKLUBO

1. ludo, kiu konsistas el 2-oble 16 pecoj, kaj oni movas ilin sur tabulo el 64 fakoj blankaj kaj nigraj/ 2. mez'epokaj soldatoj de pli ol mez'ala de-veno/ 3. venk'into en sport'konkurso/ 4. moderna kalkulilo, kiu laboras laŭ don'itaj informoj.

#### LA RUBRIKON<sup>1</sup> GUIDAS

Josef Chvosta (ĥivosta)  
Engelsova 289,  
290 01 PODEBRADY  
Ĉeĥoslovakio

Sendu ĉiun korespondadon  
rekte al tiu adreso!

⊙ En la lernejo, *Ksaver Ipsilon* faris skriban kontrolan taskon pri natur'sciencoj. Ĝi celis resumi<sup>2</sup> la tutan lernaĵon. La tasko plej-parte sukcesis al li, sed po unu el la ekzemploj ne estas ĝusta. Ĉu vi kapblas trovi la ne-ĝustan ekzemplon? Sendu al ni la korekton ĝis la fino de majo 1978!



⊙ Du legantoj el *Tallinn, USSR*, (f-ino *Ene Kildemaa* kaj la 9-jara knabo *Raul Oitspuu*) solvis ĝuste la literaturan konkurson de *JUNA AMIKO*, n-ro 7. Ni gratulas al ili.

„Naturo nomiĝas ĉio, kio vidigās ĉirkaŭ ni, do precipe *animaloj*,\* *imagoj*, *plantoj*, *mineraloj* kaj *arboj*. La opaj mondoj, kiel ekzemple la animaloj, estas subdivid'itaj. Al la animaloj apartenas inter-alie: *floroj*, *bestoj*, *insektoj*, *homoj* kaj *fiŝoj*. La dombestoj estas aparte gravaj. La homo bredas<sup>3</sup> ilin pro *lakto*, *graso*, *viando*, *faruno* kaj *felo*. La plimulto de la dombestoj estas mam-



ulo<sup>4</sup>: *kuniklo, porko, bovo, koko* kaj *ŝafo*. Oni bredas kelkajn bestojn por sia amuzo, sed ankaŭ ili estas utilaj, kiel ekzemple:



*hundo, papago, rato, kanario, kato*. La birdoj kapablas flugi. *Aglo, vulturo, struto, kolibro* kaj *gufo* estas la plej grandaj birdoj. Oni ĉasas, el la birdoj, *fazanon, pedrikon, leporon, koturon* kaj *tetron*. La plimulto de la insektoj estas malagraba; pensu ekzemple pri *puloj, kuloj, kankroj, pedikoj* kaj *muŝoj!*

La homo kulturas plurajn kreskaĵojn; gren'herbojn: *tritiko, sekalo, tri-folio, aveno, hordeo*; frukt'arbojn: *ĉerizujo, pomujo, pirujo, siringo, prunujo*; bele floras: *cejano, dianto, filiko, tulipo* kaj *lilio*. La jenaj arboj, anstataŭ foliojn, havas pinglojn: *piceo, pino, lariko, abio, tilio*. Al la fungoj<sup>5</sup> apartenas *boletoj, agarikoj, kantareloj, kardoj* kaj *trufoj*.

Oni produktas metalojn: *feron, papavon, kupron, plumbon* kaj *zinkon* el mineraloj. Al la mineraloj apartenas ankoraŭ: *karbo, nafto, akvo, salo, sablo*. Pluraj ŝtonoj: *granito, gipso, plumo, bazalto, kalko* estas uz'ataj por konstruado.

Ankaŭ la ĉielo-korpoj: *steloj, kometoj, eklipsoj, lunoj, planedoj* estas konsist'iga parto de la naturo.


La meteologio estas natur'scienco. Ĝi studas la veteron. Meteologio mezuras *aero-premon, tero-koloron, temperaturon, malsekecon de aero, direkton* kaj *rapidecon de ventoj*.

Inter la ellev'itaj vortoj, vi ĉiam trovas, do, unu vorton, kiu ne apartenas al la kvin-opo. Serĉu ĝin en ĉiu vorto-kvino, kaj karigu al ni, kial ĝi estas „fremda“ inter la ceteraj!

⊙ Ĉu vi regule kun-venas por legi la revuon JUNA AMIKO, por solvi ĝiajn enigmojn, kaj por diskuti pri la legaĵoj? Skribu al ni, kia estas via kunveno!

1. rubriko: parto, ankulo en gazetoj/ 2. ripeti ellev'ante la esencon de io/3. edukas bestojn por sia utilo/ 4. mam'uloj: bestoj, kies ido(j) suĉas lakton/ 5. fungo: post-pluva ne-verda kreskaĵo kun ĉapelo/ \*serĉu la vortojn en vartaro.

**SE VI ESTAS KONTENTA PRI NIA REVUO,  
ABONU AL JUNA AMIKO POR 1978!**



## PRI LA ŜAK'LUDO

La ŝakludo estas kon'ata en la tuta mondo. Dum libera tempo, milionoj da homoj amuzas sin per ĝi. Sed, ĉu vi scias, kiam aperis la ŝakludo?

La ŝakludo aperis, antaŭ pluraj jar'miloj, en Azio, plej frue en Hindujo. Oni trovis ŝak'pecojn, kiuj havas pli ol 2000 jarojn. Tiu-tempe, la ŝakoj estis vera milita ludo; jen tial, ĝis hodiaŭ, la nomo de la ŝakpecoj memorigas nin pri tio. En

Esperanto, la ŝakpecoj nomiĝas jene: reĝo (R), damo (D), turo (T), kuriero (K), ĉevalo (Ĉ), peono (P).

Poste, el Hindujo, la ŝakludo iris al Irano (Persio); de tie, araboj portis ĝin al Eŭropo, kie ĝi rapide dis-kon'igis. Dum la 8-a jarcento, oni jam ludis ŝakojn en multaj landoj de Eŭropo.

Ĉiuj ŝakludis: kamp'ar'anoj, kavaliroj<sup>2</sup>, urbanoj, eĉ reĝoj.

La hispana reĝo *Alfonso la Saĝa* verkis eĉ libron pri la ŝakludo.

La unua, *Anglio* aranĝis la modernan ŝakkonkurson en la 19-a jar'cento. Poste, ankaŭ aliaj landoj sekvis ĝin. Nuntempe, por la plej bonaj ŝakistoj de la landoj, oni organizas konkursojn por la titolo: „mond'ĉampiono<sup>3</sup> en ŝakludo”.

La unua mondĉampiono estis *Anderssen*. Lin sekvis *Steinitz*, *Lasker*, *Capablanca*, *Aljeĥin*, *Botvinnik*, *Smislov*, *Tal*, ree *Botvinnik*, *Petrosjan*, *Spas-*

*skij*, *Fischer* kaj la lasta: *Karpov*.

Krom la supraj ĉampionoj, estas multaj aliaj ŝakistoj, kiuj ludas preskaŭ tiel same bone, kiel la ĉampionoj.

Kio logas homojn al la ŝakludo? Ĝi dis-volvas kapablojn: atentemon, memoron, pensadon kaj la kapablon plani agojn.

Lasta-tempe, ŝakludas ne nur homoj, sed ankaŭ kompute-roj<sup>4</sup>. Tamen, neniu maŝino povas ludi tiel bone kiel la plej lertaj ŝakistoj.

PIED'NOTOJ sur la 16-a paĝo



## LUDU ŜAKON!

Vi legis en la septembra (11-a) numero ke, en 4 sin-sek-vaj numeroj, JUNA AMIKO malfermos konkurson por ŝakludantoj. La unua premio estos 4-taga sen-paga gastigo en urbeto Kalocsa. En la konkurso povas partopreni nur gejunuloj ĝis la aĝo de 18 jaroj.

*1-a problemo*

Comius Mensfield

Anglio

Mato en 2 movoj (komencas la blanka).


*Blanka:* Rh3, Da6, Tc2, Kf6.

Ĉa8, Pa2, d3, d5 (8 pecoj)

*Nigra:* Rc5, Db3, Ĉc3, Pa3, a4

(5 pecoj)

Lim'dato por la solvoj: *la 31-a de marto 1978*. (Skribu sur la koverton: „Ŝako en Juna Amiko” Adreso: d-ro *J. Németh*; Szabó J. u. 3.; H—6300 KALOCSA; Hungario.)



**ABC**  
POR KOMENCANTOJ

## Romano *Grispan*

### SERCAJ VERS' AJOJ

Laŭ temoj el la proza<sup>1</sup>  
„Enigmario”  
de Jan Sadowski (Pollando)

#### 1

Kial virinoj ne ludas futbalon<sup>2</sup>,  
kial ne amas ĉi<sup>3</sup> sportan batalon?  
Vi, sen sukceso, klopodus<sup>4</sup> ja

prov<sup>5</sup>  
tiajn dek unu virinojn el-trovi,  
kiuj konsentus sin vesti, por  
spekto<sup>6</sup>,  
per sportaj kostumoj<sup>6</sup> de sama  
aspekto.

#### 2

Kial leporo<sup>7</sup> la kampojn  
tra-kuras?  
Mankas bileto, do ĝi ne veturas.  
Kial sur montoj ĝi kuras de pelo?  
Mankas, en montoj,  
konvena... tunelo<sup>8</sup>.

#### 3

Kiu sin puŝas en ĉiun angulon?  
Ĉu konas vi tiun arogantulon<sup>9</sup>?  
Li ĉien sin ŝovas sen hont<sup>9</sup>, sen  
gentilo.  
Nom'ig<sup>10</sup>as sin-truda ul'aĉ: ...  
balailo.

1. ne-versa/ 2. pied»pilkon/ 3. ĉi tiun/  
4. farus penojn por atingi ion/ 5.  
atento per vido aŭ aŭdo/ 6. vesto,  
komuna por, ekzemple, futbalistoj/ 7.  
long'orela sovaĝa kün'besto/ 8. gran-  
da longa bor'ajo tra monto/ 9. ho-  
mo, kun malŝata konduto/ 10. tru-  
di: devigi iun al io malagrabra kon-  
traŭ lia volo.

## Miaj karaj Kastoroj!

Post mia lasta letero al vi,  
mi faris belan viziton al Ka-  
nado! Eble, interesos vin aŭdi  
pri ĝi. Mia edzino kaj mi vizi-  
tis mian fratinton kaj ties ed-  
zon, kiuj loĝas en Otavo (Otta-  
wa), la ĉef'urbo. Bedaŭrinde,  
pro tro alta kosto, ni ne povis  
vidi tre grandan parton de tiu  
grandega lando, sed ni tamen  
faris multajn interesajn vizi-  
tojn, kaj lernis multon pri la  
lando.

Ni flugis el la flug'havono de  
Manchester ĝis Toronto kaj,  
dum la vojaĝo, ni flugis super  
la suda parto de Groenlando.  
(Trovu ĉiujn lokojn sur la ma-  
po<sup>1</sup>!) Flugo al Toronto, per  
grandega jeto<sup>2</sup>, kiu en-tenis 400  
personojn, okupis 7 horojn.  
Post tio, ni flugis, per malpli  
granda jeto, al Otavo, kie niaj  
parencoj renkontis nin, kaj ve-  
turigis nin al sia hejmo.

Dum la unua semajno, ni vi-  
zitis multajn lokojn en kaj ĉir-  
kaŭ Otavo. La urbo ek-estis  
dank' al la 200 km-ojn longa  
Kanalo Rideau (:rido), kons-  
tru'ata inter la jaroj 1826 kaj  
1832. La ĉef'konstru'isto de tiu  
kanalo estis Kolonelo<sup>3</sup> By  
(:baj), kaj unue la urbo nom'igis  
Bytown (By-urbo). En 1857, la  
brita reĝino Victoria elektis  
Otavon kiel ĉefurbon de la du  
provincoj<sup>4</sup>: Kebeko (france pa-  
rolanta) kaj Ontario (angle pa-  
rolanta); kaj kiam la Konfede-  
racio<sup>5</sup> de Kanado starigis, en  
1867, tiam Otavo iĝis ĝia ĉefurbo.

# KASTORA LETERO

## De J. H. SULLIVAN

Post tiu unua semajno, ni vizitis la plej sudan angulon de Kanado, kaj ni vidis la grandiozajn<sup>6</sup> akvo-falojn de Niagara kaj, post tio, la antaŭan ĉefurbon de Alta Kanado, Kingston. Ĝi situas tie, kie la grandega rivero Sankta Laŭrenco fluas el la Lago Ontario.

De tie, ni trans-iris en la nordan parton de Usono, por viziti Lake Placid (Trankvila Lago), ejo de pluraj Vintraj Olimpikoj<sup>7</sup>, — kaj de la ven'onta, en 1980. Tie, ni iris al la supro de Monto Whiteface (Blanka Vizaĝo), de kie, ni povis vidi la Lagon Champlain (:ŝamplen), kiu kuŝas inter la Adirondak-montoj de la ŝtato Novjorko kaj la Verdaj Montoj de la ŝtato Vermont. La lago ricevis sian nomon de la franca esplor'isto Samuĝelo Champlain, kiu trovis ĝin en la jaro 1608. En tiu sama jaro, li starigis kolonio-vilaĝon<sup>8</sup> en Kebek. Tiu vilaĝo nun estas tre granda urbo, kaj, de tiu tempo, la urbo kaj la provinco Kebeko ĉiam estas france parolantaj. Post mia vizito, mi legis libron pri Champlain. Ĝi enhavis interesan rakont'eton:

En la jaro 1613, la esploristo ŝaris vojaĝon, kiu — li esperis — kondukos lin al la norda maro (Hudsona Golfo), kaj, de tempo al tempo, li kaj lia grupo devis porti siajn kanuojn<sup>9</sup> tra arbaroj. Dum unu el tiuj pied'iroj, Champlain devis trans-iri super grandajn fal'intajn arbojn, kiaj li lasis fali sian astrolabon (ilon por mezuri latitudojn<sup>10</sup>). Li ne povis trovi ĝin kaj, post tiu perdo, li ne plu povis fari ĝustajn mapojn de sia vojaĝo. Tiu astrolabo kuŝis inter la arboj dum 254 jaroj! En la jaro 1867, knabo trovis kaj trans-donis ĝin al siaj gepantoj. Nun ĝi troviĝas en muzeo de Novjorko.

Mi neniam forgesos mian viziton al Kanado... sed mi tamen ne volus konstante loĝi tie, ĉar, dum la vintro, la vetero estas ege malvarma, kaj kvankam Otavo kuŝas je la sama latitudo kiel Milano en Italio, en la vintro, ĝi estas pli malvarma ol Moskvo.

### ALIAJ PROMOCIITOJ

Inter ja preparado de la septembra Kastora Letero (en februaro) kaj aŭgusto, kiam mi preparas ĉi tiun leteron la jenaj Kastoroj atingis pli altan gradon:

FARIĜIS ARGENTAJ KASTOROJ:

725 MORI, Jasuo (Japanio),

784 ŽAK, Vladimír (Ĉeĥoslovakio),

786 ŽAKOVÁ, Hana (Ĉeĥoslovakio).

## FARIĜIS BRUNAJ KASTOROJ:

675 D. Greiner (Francio), 700 R. Greiner (Francio), 725 J. Mori (Japanio), 680 A. Adronico (Italio), 681 C. Baglione (Italio), 682 M. Bazzano (Italio), 683 T. Calabro (Italio), 684 A. Catanio (Italio), 685 S. Crisafi (Italio), 686 S. Di Bella (Italio), 687 A. Giuffrida (Italio), 688 A. Longo (Italio), 689 M. Maggio (Italio), 690 C. Rigano (Italio), 691 A. Rizza (Italio), 692 M. Russo (Italio), 693 A. Sanfilippo (Italio), 694 C. Scarpaci (Italio), 695 M. Spompinato (Italio), 696 T. Sparta (Italio), 697 D. Stella (Italio), 698 S. Sutera (Italio), 699 G. Zappulla (Italio), 711 A. Bartoniková (Ĉeĥoslovakio), 712 I. Horáková (Ĉeĥoslovakio), 713 J. Petr (Ĉeĥoslovakio), 714 J. T. Gavendová (Ĉeĥoslovakio), 715 J. Vokounová (Ĉeĥoslovakio), 716 O. Stárk (Ĉeĥoslovakio), 784 V. Žák (Ĉeĥoslovakio), 785 J. Záková (Ĉeĥoslovakio), 786 H. Záková (Ĉeĥoslovakio).

*Ne forgesu, ke Kastoretoj rajtas teni tiun gradon nur dum unu jaro, kio signifas, ke tiuj (kun membro-numeroj ĝis 752), kiuj ankoraŭ ne fariĝis Brunaj Kastoroj, devos tion fari antaŭ la fino de decembro 1977.*

1. land'karto/ 2. aviad'ilo pel'ata per el-ĵeto de gasoj/ 3. alt'ranga soldato/ 4. la ŝtatoj, far'antaj Kanadon/ 5. unu-iĝo de apartaj ŝtatoj/ 6. tre grandajn rigard-indajn/ 7. internaciaj sport'ludoj. okaz'antaj en ĉiu kvara jaro/ 8. kolonio: loĝ-loko de homoj el alia lando/ 9. kanuo: malpeza boato (ŝipeto)/ 10. latitudo: ĉiu el la horizontalaj linioj cirkaŭ la ter'globo.



1. libro-tenejo/ 2. indigni: senti koleron pro malnobla konduto.

Napoleono estis nur 151 cm alta. Kiam, iufoje, en biblioteko<sup>1</sup>, li vane provis atingi libron, kiu staris sur iom alta breto, la bibliotekisto afable diris:

„Permesu, ke mi de-prenu la libron; mi estas pli granda ol vi.”

Tiam Napoleono respondis indigne<sup>2</sup>:

„Vi volis diri: pli longa ol mi.

ANEKDOTO

⊙ 14-jara lernantino serĉas sam-aĝajn knabinojn por korespondi kun ili. Adreso: *Elizabeta Pazdernik*; Népköztársaság út 34.; H—1061 BUDAPEST; Hungario.

⊙ 15-jara knabo deziras korespondi kun pioniroj de diversaj landoj. Skribu al: *István Horváth*; Bocskai út 7. fszt. 2.; H—2400 DUNAÚJVÁROS; Hungario.

⊙ 15-jara knabo deziras korespondi pri diversaj temoj. Li kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn kaj insignojn. Leterojn adresu al *Thomas Mizera*; Carl-Maria-de-Weber-placo, n-ro 2; DDR—83 PIRNA; Germ. Dem. Resp.



⊙ 17-jara lernantino serĉas leter-amikojn. Ŝi interesigas pri muziko, interŝanĝas poŝtmarkojn. Adreso: *Aleksandra Pecak*; ul. Podzamce 69.; PL—42 500 BEDZIN; Pollando.

## SOLVOJ

1. *Ŝajnaj vortkunmetoj (n-ro 10)*.  
Gajnis: *Eva Wolf*, Hartmannstr. 12, 99 PLAUEN, GDR; *Oleg Mitrofanov*, str. Toljatti 28—40, 347919 TAGANROG, USSR, *Manfred Schmidt*, A 007/906, 409 HALLE-NEUSTADT, GDR.

2. *Paronimoj (n-ro 11)*:

vento — ventro (R); peri — pe-rei (E); esti — vesti (V); rado — radio (I); pario — Parizo (Z); pluso — poluso (O); pesi — presi (R); krano — korano (O); REVI-ZORO de Gogol.

## JUNA AMIKO

### Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

de la Hungara Esperanto-Asocio (H—1368 Budapest 5. P.f., 193.). Responda eldonisto: TIBOR VASKÓ. Redaktoro: GÉZA KURUCZ. Kunlaborantoj: D. Berndt (GDR), M. Boulton (Anglio), J. Chvosta (Ĉeĥoslovakio), As. Grigorov (Bulgario), R. Grišpan (Sovetunio), V. Heimlich (Israelo), L. Jevsejeva (Sovetunio), E. Linz (Aŭstrio), R. Okumura (Japanio), s-ino G. Ósz (Hungario), B. Ragnarsson (Islando), Z. Rehorić (Jugoslavio), s-ino Saranath (Hinda Unio), J. H. Sullivan (Anglio), s-ino M. Turin (Francio), J. Zágoni (Rumanio), W. Żytyński (Pollando), Grafikistoj: J. Klement, P. Rak (Ĉeĥoslovakio), S. Pluĝor (Rumanio), s-ino É. Váli, Z. Vámos (Hungario). Lingva kontrolo: A. Lienhardt (Francio), A. Pechan (Hungario).

Kiadói Főig. engedélyszáma:

Minisztertanács Táj. Hiv. — III/1FJ/30/76



## EBLA VORT'DIFINO<sup>1</sup>

„Kio estas svetero<sup>2</sup>, Petro?” demandas la instruistino.

„Vestaĵo, kiun infanoj devas surmeti, kiam ilia avino sentas malvarmon”, respondas Petro kun plena certeco.

1. klarigo pri la signifo de la vorto/ 2. vama vestaĵo por la supra korpo-parto.



## EGALECO LAU VIRINA MANIERO

Post la unua malpac'igo, jun'edzino proponas al sia edzo:

„Por ke io tia neniam plu okazu, Emilo, ni faru tiel: kiam ni havos malsamajn opiniojn, tiam decidu la mia; kaj kiam ni havos samajn opiniojn, tiam decidu la via”.

